

Albert Theodor Gellerstedt,

En Baĥaraĥ'

tradukita de N. N. 53

Desegnante multthore ni sidis
en sunbril' en monta ruin'.
Jam ne ŝercis ni, aŭ ridis,
sed sopiris al mang' kaj vin'.

En la urb' en la valo ni trovis,
kiel neston de birdogent',
gastejon en florgardeno
kun malnova stil' kaj silent'.

Nia tablo staris en ombro
en ŝirm' je suna varmaj';
da glasoj jen plena nombro,
kaj bonodoranta rostaj'.

Malnovtempon ni vidis revante,
ĉar ne estis moderna la ŝajn' -
malaltpreze ja ĉio, kaj grandkvante,
sed ne konsideroj pri gajn'.

Ekbruligis la pipojn ni feliĉaj,
kaj leviĝis la fum' al plafon'
konsistanta el branĉoj foliriĉaj
en volbeforma malpeza kron'.

Sentante viklecon kaj ĝojon
pli ol estis kutime al ni,
nur malfrue ni iris la vojon
por ĉiam for el dom' tiu ĉi.

La gemastra filin' ĉe la pordo,
kun bela ruĝec' sur vizaĝ',
donis rozojn en ĉarma ordo,
kaj bondezirojn por nia vojaĝ'.

*Traduko de la Sveda poemo "I Bacharach" de ALBERT THEODOR GELLERSTEDT (*1836-10-06 - †1914-04-07) en Esperanton de N. N. 53.*

MR-480-0 / Arg-816-1637 (2013-02-04 10:42:54)

Esperantigo verkita de nekonatulo. Vidu ankaŭ: <http://www.literaturo.dk/baharah.htm>.